FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner - Esperanto - Vereinigung
in der Stiftung Bahn - Sozialwerk

Fondita 1952 Numero 2 Aprilo / Junio 2001



La nova GEFA – estraro

De dextre:

Ĉefkomisiisto Rolf Terjung, Kasistino Helga Vogelsang,
Prezidanto Joachim Gießner, Sekretario Bodo Ehrlich

53a IFEF-Kongreso en Tábor



La specifa etoso, kiun konas nur amikoj de la Internacia lingvo, regis dum unu semajno en la historia ĉeĥa urbo Tábor. El 18 eŭropaj landoj kolektiĝis fervojaj esperantistoj por trakti komune siajn organizajn aferojn, por informi sin pri fervojaj novaĵoj, sed nelaste ankaŭ por ĝui kulturajn kaj turismajn aranĝojn.

Inter la 12a kaj 19a de majo 2001 la hotelo Palcát, nomita laŭ mezepoka heroo, estis la centro de ampleksa kongresprogramo.

Dum la solena inaŭguro la honoraj gastoj, inter ili Ivo Malina, vicdirektoro de Ĉeĥaj Fervojoj (ČD), bonvenigis la ĉeestantojn kaj alte prijuĝis la laboron de la esperantistoj. Tion esprimis en la kongreslibro ankaŭ Dalibor Zelený, ĝenerala direktoro de ČD kaj protektanto de la kongreso. Urbestro František Dědič esprimis sian ĝojon, ke la Internacia Fervojista Esperanto-Asocio (IFEF) elektis Tábor por sia 53a kongreso. Laŭdaj vortoj pri celo kaj valoro de Esperanto inter diverslandaj fervojistoj venis flanke de la Internacia Ferderacio de kulturon flegantaj fervojistoj (FISAIC), ĉu estis Vojtěch kiel prezidanto de la landa asocio, ĉu estis Georges Wallerand (Luksemburgo) kiel ĝenerala sekretario. Simile esprimis sin la ceteraj parolantoj. Post flutmuziko per ĉarmaj junulinoj transdonis delegitoj la salutojn de siaj landaj asocioj: Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Danio, Francio, Germanio (unuafoje Rolf Terjung), Hispanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Kroatio, Norvegio, Rumanio, Slovakio, Svisio, kaj Ĉeĥio. IFEF-prezidanto Romano Bolognesi (Italio) akcentis la fervojfakan laboron de IFEF-membroj.

Pro siaj multjaraj valoraj laboroj tri IFEF-membroj estas nomumitaj kiel honoraj membroj de la federacio: Dieter Hartig (Germanio), Ernst Glättli (Svisio) kaj Henning Hauge (Danio). La Kongreso estas malfermita. La Esperanto-himno finis la inaŭguron.

Antaŭe estis okazinta ekumena diservo en preĝejo de Husana Eklezio. Kun katolika pastro, husana pastorino kaj reprezentantino de ĉeĥfrata Evangelika Eklezio multnombraj partoprenantoj komune preĝis kaj kantis.

Al la ĉefaj taskoj de IFEF apartenas fervojfakaj laboroj. La Terminara Komisiono gvidata de D-ro Heinz Hoffmann, konstante laboras kun la Internacia Fervoja Unio (UIC), kiu eldonis intertempe fervojajn terminarojn en 12 lingvoj sur elektronika disko (CD-Rom). Nuntempe pli gravas la difinado de bazaj terminoj.

La Fake Aplika Komisiono, gvidata de Jan Niemann (Danio), prezentis al atente aŭskultantoj la ĉefan fakprelegon. Preleganto estis por la temo "Moderna sekuriga kaj komunikada tekniko de Ĉeĥaj Fervojoj" Ladislav Kovár. En pli konciza formo estas pritraktitaj la sekvaj temoj: Eksteraj kostoj de trafiko (Jugoslavio); Rekonstruo de fervojaj koridoroj en Ĉeĥa Respubliko; Apliko de lumo-ondokondukilo pri telekomunikado, sekurigaj instalaĵoj kaj teleregado ĉe Aŭstriaj Ŝtataj Fervojoj; Translima trafiko per Egro-Net (Germanio); Ŝprucigpentrantoj kaŭzas al la Ĉeĥaj Fervojoj mul-

timilionajn damaĝojn; Bonaj trajnoj por ĉiuj (Danio); Olomouc-rekonstruo de antaŭstacidoma spaco (Ĉeĥio); Klasifiko en terminologia procedo (Ĉeĥio).
En publika kunsido la IFEF-estraro pritraktis kun la komitato organizajn aferojn. La ĝisnuna estraro estas reelektita krom la sekretario. Tiun oficon transprenis Marica Brletić (Kroatio). La komitato akceptis la inviton de la bulgara landa asocio organizi la 54an IFEF-kongreson en Plovdiv inter la 1a kaj 7a de junio 2002. En 2003 Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) aranĝos la 55an IFEF-kongreson. Pri la aliaj temoj de la abunda tagordo raportas la organo de IFEF.
Du vesperoj estas dediĉitaj al kulturo. Elena Puchova rusdevena estis en unu persono komponisto, pianisto kaj kantisto. Majstre ŝi prezentis en Esperanto leĝerajn muzikaĵojn. Du aliaj elstaraj kantistoj, Kateřina Kudliková kaj Miroslav Smyčka ĝojigis la aŭskultantojn per belsonaj kantoj el konataj operoj kaj operetoj. La traduko de la tekstoj estis la verko de la multtalenta honora IFEF-prezidanto Joachim Giessner. Ne mirinde, ke la muzika vespero finiĝis per merita aplaŭdo.
Ĉeĥajn popolajn dancojn el suda Bohemio prezentis dum folklora vespero la ensemblo Úsvit. Ĝi ekzistas depost 50 jaroj kaj akiris internacian reputacion. La ĝojo, per kiu sakfajfila muzikistaro akompanis la dancojn, transiris al la spektantoj, precipe kiam dancistinoj instigis kelkajn kongresanojn danci komune sur la scenejo. Denove sukcesinta vespero. En bona memoro restas la banketo kun sekva balo. La ensemblo Keramička stimulis al vigla dancado ĝis la fino de agrable pasinta vespero.
Precipe menciindas la akcepto en la urbdomo. En gotika halo bonvenigis la urbestro František Dědič delegitojn kaj honorajn kongresanojn. IFEF-prezidanto Bolognesi dankis por la kora alparolo kaj transdonis flageton kun la federacia emblemo. Multvaria bufedo atendis la gastojn.
La surprize granda nombro de turismaj ofertoj plenumis la dezirojn de preskaŭ ĉiuj partoprenantoj, ekzemple promenado tra la urbo inkluzive vizito al la renovigita baroka monaĥejo de Klokoty. Ŝatantoj de nostalgio veturis per elektra motorvagono al la banloko Bechyně. Survoje kantis en la historiaj vagonoj folklora grupo. Alia ekskurso kondukis al la sudbohemia urbo Česka Budějovice (Budweis), de kie la unua, 129 km longa ĉevalfervojo trafikis ĝis la aŭstria urbo Linz.
Kulmino estis la tuttaga ekskurso. La urbo Telč estis la unua celo. Vidindaj estis la renesanca rezidenco kaj la pitoreskaj pergoloj en la renovigitaj domoj. Post komuna tagmanĝo la aŭtobuso atingis la distriktan urbon Jindřichův Hradec, kies romanika kastelo invitis al vizito. La vesperon pasigis la ekskursantoj en la vilaĝo Holašovice. Ĝi troviĝas en la listo de kultura heredaĵo de UNESCO pro bone konservita sudbohemia bienvilaĝa baroko. Regis laŭta blovmuziko kaj gaja etoso.
Kio krome menciindas? Plaĉa kongreslibro liveris klarajn informojn. En la akceptejoj oni vendis kaj mendis librojn. La poŝto disponigis specialan ŝtampon dum unu tago. Loka gazeto raportis favore pri la kongreso.
La fino alproksimiĝis. En la kongresejo IFEF-prezidanto Bolognesi dankis al ĉiuj organizantoj, precipe al LKK-estro Petro Chrdle kaj Jindrich Tomišek kun iliaj afablaj gehelpantoj. Post transdono de la flago al la bulgara delegito finiĝis la 53a IFEF-kongreso per la Esperanto-himno. Malgraŭ modesta nombro de 190 aliĝintoj, inter

ili nur malmultaj germanoj, niaj ĉeĥaj gekolegoj sukcesis organizi sukcesplenan kongreson. Ni dankas kaj alvokas: ĝis revido venontjare en Plovdiv!

W. B

Ehrung für Joachim Gießner en Tábor

Joachim Gießner, langjähriger Vorsitzender der Deutschen Eisenbahner-Esperanto Vereinigung (GEFA) und des Internationalen Eisenbahner-Esperanto-Verbandes (IFEF) erhielt für seine ununterbrochene Teilnahme an 50 IFEF-Kongressen eine besondere Ehrung.

Beim 53. Kongress in Tábor (Tschechien) erinnerte Georges Wallerand, Generalsekretär des Internationalen Verbandes kulturschaffender Eisenbahner (FISAIC), an die zahlreichen Auszeichnungen, mit denen Gießner für seine langjährige ehrenamtliche Tätigkeit gewürdigt wurde. Gießner erhielt das Bundesverdienstkreuz. Er wurde Ehrenmitglied des Universalen Esperanto-Bundes (UEA), Ehrenmitglied des FISAIC, Ehrenvorsitzender von IFEF sowie Ehrenvorsitzender von EK Ústí nad Laben.

Außerdem luden ihn zahlreiche Freunde aus verschiedenen Ländern an einem Abend in der Kongresswoche zu einem gemeinsamen Essen ein, in dessen Rahmen der IFEF-Vorsitzende Bolognesi dem Jubilar eine Ehrenurkunde überreichte. Petro Chrdle, der Organisator des IFEF-Kongresses, gratulierte mit einem Blumenstrauß herzlich im Namen der Kongressteilnehmer.

Die GEFA-Mitglieder und sonstigen Freunde schließen sich diesem Glückwunsch an.

W. B

Dank- und Anerkennungsurkunde

Der Stiftung Bahn-Sozialwerk (BSW) für

Joachim Gießner

Für seine verdienstvolle Tätigkeit für die Stiftung Bahn-Sozialwerk (BSW) erhielt unser Präsident Joachim Gießner vom Vorstand des BSW eine „Dank- und Anerkennungsurkunde" mit folgendem Wortlaut:

„Sie waren seit dem Jahre 1957 bis zum 31.12. 2000 ehrenamtlich und erfolgreich für unser BSW als ***Hauptbeauftragter für Esperanto*** tätig. Bei gleichzeitiger Ausübung weiterer Funktionen in diesem Fachgebiet haben Sie bedeutende nationale und internationale Akzente gesetzt. Hierfür sprechen wir Ihnen unseren Dank und unsere hohe Anerkennung aus. Für Ihr weiteres Wirken wünschen wir alles Gute!"

Wir, alle Mitglieder des GEFA, schließen uns dieser Ehrung an und danken für seinen mehr als vier Jahrzehnte ununterbrochenen Einsatz, besonders in der letzten schweren Periode der Umgestaltung der Bahn mit ihren enormen Schwierigkeiten.

Wir wünschen Joachim Gießner gemeinsam mit seiner Frau noch viele ruhige angenehme Jahre bei guter Gesundheit.

GEFA

Goldene Hochzeit – Heinz und Erna Papenfuß



Sie gaben sich am 10. März 1951 in der Dorfkirche von Volkmarode Ihr „Jawort".
Es war eine typische Nachkriegsliebe. Erna kam 1946 als Flüchtling aus Ostpreußen nach Braunschweig und Heinz (seine Heimat war Pommern) kam 1948 aus englischer Gefangenschaft. 1942 begann er in Pommern als Eisenbahner. Nach 43 arbeitsreichen Jahren ging Heinz 1985 in Braunschweig in den Ruhestand.
1955 fing seine Laufbahn als „Esperanto-Sprecher" an, unterrichtet u.a. auch von Joachim Gießner. 1957 haben Erna und Heinz zum ersten Mal einen Esperanto-Kongress, den in Rijeka, Jugoslawien, besucht. Anschließend waren es für Heinz nicht weniger als dreißig und für Erna nicht weniger als zwanzig internationale Kongresse, an welchen sie teilnahmen. Auch als Mitwirkende in einem Esperantofilm, gedreht im alten Braunschweiger Bahnhof unter Leitung von Joachim Gießner, sind beide mit ihrem Sohn zu sehen.
Ihre Goldene Hochzeit feierten sie am 10. März 2001 mit drei Enkeln und zwei Enkelinnen in derselben Kirche, in der sie sich vor fünfzig Jahren ewige Treue versprachen.
Wir gratulieren herzlich und wünschen beiden und ihrer Familie für die Zukunft viel Glück und Gesundheit. (Die schöne Foto-Collage hat der Sohn Knut hergestellt.)

GEFA

Nekrologo

Joachim Schrapp

***30.08. 1914 - † 15.03. 2001**



Nia diligenta kolego, fidinde konscienca kamarado, serene afabla amiko ***Jochen***, kiel lin nomis kaj konis liaj geamikoj, devis post plurjara grava malsano forlasi nin. El pluraj Vestfaliaj lokoj kolegoj de GEFA kaj membroj de lia Esperanto-Societo Münster akompanis lian lastan vojon en Bentheim apud la nederlanda limo.
Denaske dulingva, kun nederlanda patrino, li jam frue sentis la lingvan dilemon, kiel juna fervojisto en fremda lando orient-Eŭropa. Baldaŭ post la granda milito Jochen komencis akiri lingvan kapablecon kaj Esperanto-praktikadon en Gronaŭ kaj Münster. Granda kvanto da taskoj kaj oficoj lin katenis al nia movado dum 50 jaroj. Ĉiam preta kaj bonvolema Jochen plenumis respondecajn laborojn en UEA, GEFA kaj la loka Esperanto-Societo, ĉu instruajn, informajn, reprezentajn, funkciulajn, ĉu kiel inventeme fantaziplena helpanto en multegaj renkontoj, kunvenoj, kongresoj regionaj kaj internaciaj de ESM, REVELO, GEA, GEFA, IFEF, ja eĉ TEJO.

La vivo ne ĉiam dorlotis lin. Nekuracebla kancero forprenis lian unuan edzinon el la juna familio. 20 jarojn poste la sama sorto trafis la amindan filinon Ute. En 1956 bonŝance por Jochen nia fervojista kolegino ***Ursula*** krucis lian vojon. Baldaŭ post geedziĝo ni vidis ilin kune en ĉiaj niaj renkontoj. De tiam Ursula ankaŭ aktive partoprenis lian multfacetan Esperanto-vivon. Sennombraj eventoj tiel memorigas nin pri la gaja paro Ursula kaj Jochen.
Nian komunan lingvon Jochen konsekvence parolis ankorau ĝis la finiĝo de esprimkapablo. Ni kun liaj multenombraj amikoj en tutmonda Esperantujo elkore kondolencas al lia familio, sed ĉefe kaj unuarange al nia amikino Ursula. Ŝi ne nur vivindigis la tempojn de Jochen, sed en tre malfacilaj cirkonstancoj ankaŭ ameme kaj sinofere flegis lin dum la jaroj de sufero ĝis la lasta spiro.

wbr

Por Esperanto - Societo Monastera, Münster
Fervojista Rondo en BSW

Willi kaj Guido Brandenburg

La GEFA – prezidanto Joachim Giessner nome de GEFA kaj propranome skribe kondolencis al Ursula Schrapp kun danko por ĉio, kiun Jochen dum multaj jaroj faris por la asocio.

GEFA

Aus den Gruppen

Bremen im Internet ! www.Esperanto.de/bremen

Die Eisenbahner- und die örtliche Gruppe präsentieren sich gemeinsam im Internet. Dort können weltweit (=www) unser Informilo und unser Programm gelesen und unsere Aktivitäten verfolgt werden.
Unser sehr aktives und bekanntes Mitglied Franz Kruse hält unser Internet-Aushängeschild immer auf dem Laufenden.
Unser Informilo erscheint vierteljährlich in Farbe und mit Fotos aus dem Gruppenleben. Es lohnt sich bei uns hineinzuschauen – vielleicht sind auch für Sie Anregungen dabei.

Hg

Frankfurt

Bericht der BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt / der Esperanto-Gesellschaft eV Frankfurt

Die Geschichte des klassischen Jazz

Zum gemeinsamen Treffen am 01. 03. 2001 konnten wir als Referenten Herrn Frank Selten (Bruder des Prof. Dr. Reinhart Selten, Nobelpreisträger, beide Mitglieder der Esperanto-Gesellschaft Frankfurt) begrüßen.
Nach seinen Ausführungen ist Jazz eine gegen Ende des 19. Jahrhunderts im Süden der USA entstandene eigenständige und zunächst von Farbigen geprägte Musik. Die Herkunft des Begriffs „Jazz" ist noch nicht geklärt.
Die Urform dieser Musik haben damals die Sklaven aus dem schwarzen Kontinent (Afrika) mitgebracht. Dies verdeutlichte der Vortragende eindrucksvoll an Hand von Hörproben mit Rhythmus, Melodie und Leidenschaft.
Selten hat dabei auch die verschiedenen Entwicklungsphasen und die diversen Richtungen des Jazz bis dato fachlich versiert dargelegt
Frank Selten spielt selbst Klarinette und Saxophon in der bekannten Barrelhouse Band, die 1953 gegründet wurde und in über 50 Ländern auftrat.

Dem Gestalter des Hauptprogramms des Abends, der von weit über 20 Teilnehmerinnen und Teilnehmern besucht war, gebührt für den aufschlussreichen, in Espernto gehaltenen Vortrag Dank und Anerkennung.

Egon Kiefer

Zeitungsartikel, in denen Esperanto behandelt wird,

möchte unser Sekretär Bodo Ehrlich in unserer Jahresversammlung ausstellen. Diese gute Idee sollten wir alle unterstützen.
Darum bitten wir die Teilnehmer, solche Zeitungsausschnitte mitzubringen. Fügen Sie bitte den Namen der Zeitung und das Erscheinungsdatum bei. Sie sollten möglichst neueren Datums sein.
Wer taugliche Zeitungsausschnitte hat und nicht an der Jahresversammlung teilnimmt, sende sie bitte an:
Bodo Ehrlich, Buddestr. 46, 28215 Bremen.

Dringend gesucht

Unser ĉefkomitatano Rolf Terjung sucht dringend die folgenden Nummern unseres Bultenos: Jahrgang 1989, Nummer 4; 1992, Nummer 5, und 1993, Nummer 1. Wer helfen kann, wende sich bitte telefonisch an Rolf Terjung, Tel. und Fax 0203 72 40 95.

**Unser Werbefaltblatt kann nur erfolgreich sein,
wenn es mit Bedacht angewendet wird.
Jeder von uns hat hier die Möglichkeit, den Schrumpfungsprozeß von GEFA zu unterbrechen!
Jeder Bba hat einen Vorrat! Helft mit, verteilt unser Werbefaltblatt gezielt.**

Hier machen alle mit !

Für das im Aufbau befindliche Archiv der Stiftung Bahn-Sozialwerk möchten wir möglichst viel Material über die Tätigkeit der deutschen Eisenbahner – Esperantisten beitragen. Einige Beispiele, was besonders gesucht wird:
>> Alte Zeitschriften, auch aus der Zeit vor dem ersten Weltkrieg, in denen unsere Tätigkeit erwähnt wird.
>> Exemplare der Unterrichtszeitschrift „Der Eisenbahner" von 1950 bis 1956, in denen ein mehrjähriger Esperanto-Lehrgang für Eisenbahner erschienen ist.
>> Alle Exemplare des „Das Sozialblatt", soweit in ihnen Berichte über unsere Veranstaltungen enthalten waren (bis etwa 1979).
>> Jegliches Material von GEFA-Jahresversammlungen.
>> Material von IFEF-Kongressen in Lindau, Fulda, Regensburg und Münster.
>> Material von UEA-Kongressen in Mainz, Augsburg und Berlin, soweit die Mitwirkung von GEFA betroffen ist.
>> Presseveröffentlichungen.

>> Fotos, Kongressabzeichen.
>> Prospekte der DB und ausländischer Bahnen in Esperanto.
>> Kursbücher, auch aus dem Ausland, mit Erklärungen in Esperanto.
>> Material der Fachgruppen aus dem Bereich der ehemaligen DDR.
Bitte alle Beiträge an Rolf Terjung, Finkenschlag 68, 47279 Duisburg senden.

Gelungenes Seniorentreffen in Osnabrück

Eine muntere Seniorengruppe traf sich am 26. April in Osnabrück in dem urigen Lokal „Rampendahl". Zu Beginn waren alle damit beschäftigt, das Wiedersehen zu feiern. Es gab viel zu erzählen und die Wiedersehensfreude war allen anzumerken. Besonders herzlich wurde Ursula Schrapp begrüßt. Wir haben uns gefreut, dass sie wieder den Weg zu uns gefunden hat.
Rolf Terjung, der Organisator des Treffens, skizzierte lebhaft und interessant die Geschichte Osnabrücks und viel Wissenswertes aus der Stadt. Besonders erwähnte er den Westfälischen Frieden. Auch geisterten die Germanen, die Römer und damit die Varusschlacht, Karl der Große und vieles mehr durch die Historie.



Nach dem sehr guten Mittagessen führte uns Otto Rösemann geschickt durch die Altstadt seiner Heimatstadt Osnabrück. Wir sahen imposante Bauwerke und besuchten Kirchen. Der Höhepunkt aber war die Besichtigung des Friedenssaals, in dem das Ende des Dreißigjährigen Krieges besiegelt wurde. Wir haben uns gefreut, dass Otto Rösemann uns diese Besichtigung möglich machte.
Kaffee und Kuchen beendeten unser Seniorentreffen. Mit Dank an Rolf Terjung für das gelungene Treffen und seine Mühen, die er auch diesesmal für uns aufgewendet hat, machten wir uns auf den Heimweg. Hg, Foto: K.H. Marzahn

Redaktfino por FE 3/2001 estos la 25. 08. 2001
Stiftung Bahn - Sozialwerk Hauptvorstand Frankfurt am Main
Schritfleitung / redakcio: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen. HD.Hartig@t-online.de
Textgestaltung/tekstaranĝo: Klaus-Dieter Hartig, Gustav-Heinemann-Str. 70, 28215 Bremen